

Paul Gerhardt,
Vekiĝu, mia koro

tradukita de Manfred Retzlaff

Vekiĝu, mia koro
Kaj kantu en adoro
Al via kara Dio,
Per kiu iĝis ĉio.

Ĉirkaŭis en malhelo
Min ombroj kaj malbelo,
Satano min deziris,
Sed Dio interiris.

Li diris: Nun senĝene
Pludormu, kvankam pene
Satano vin insidos,
Vi ja la sunon vidos.

*Traduko de la Germana poemo "Wach auf, mein Herz und singe" de PAUL GERHARDT (*1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1983.*

MR-055-1 / Arg-735-1484 (2012-12-28 19:09:55)

La origina germana-lingva kanto havas entute naŭ strofojn. Ĝi troviĝas en la germana luterana eklezia kantlibro kaj havas tie la numeron 348.